

Sultan (suvereneco) 82

I.4.

LA NOVA TAGO

INTERNACIA BAHĀ'I-ESPERANTO-GAZETO KVARONJARE
PUPLIKIGATA PER LA ESPERANTO-KOMITATO
DE LA BAHĀ'I-MOVADO HAMBURG.

1-a jaro, n-ro 4,

1-a de Sultan (suvereneco) 82.

19-a de Januaro 1926.

„Ho Ribeluloj!

Mia toleremo estigis vin arogantaj, kaj Mia pacienco vin igis senzorgaj, tiel ke sur la vojoj de detruantaj danĝeroj, sur la ĉevalo de la fajro de pasio sentime vi rajdas. Eble Min senzorga vi opiniis aŭ sencia vi pensis!“

Baha'u'llah en „Kaŝitaj Vortoj“, 65.

„Ho filo de l' homo!

Supreniru al Mia ĉielo por ke vi ekhavu la ĝojon de la eterna reunuiĝo kaj ektrinku la senkomparan vinon el la kaliko de nepereonta gloro!“

D-ro J. E. Esslemont †

M. B., Ch. B., F. B. E. A.

Ree forpasis frato el nia rondo, kaj funebre ni memoras lian idealecon en la servo al la sankta afero, lian laboron, kiu tiom multe perigis al ni kaj kiu estis tiel modela por ni ĉiuj.

Antaŭ nelonge ni estis ĝojigataj per la komuniko, ke lia pulmito komencis reforiĝi kaj des pli forte nin trafis tiu mortsciigo.

Lia klopodado, lia peno kaj laboro estis dediĉitaj al homaranismo, – al Baha'i-movado kaj al Esperanto, – kaj treege altvalora estis por ni lia helpo kiel kunlaboranto de „La Nova Tago“.

Nia memoro al li restos daŭra.

Allah'u' Abha!

Interparolado inter 'Abdu'l-Bahá kaj kvin junaj Amerikaj instruistoj.

(El la taglibro de Ahmad Sohrab, sekretario de 'Abdu'l-Bahá; esperantigita de f-ino Agnes B. Alexander, Honolulu el „Orienta Azio“ 15. VI. 1916.)

Demando: Ĉu ekzistas gvidanto aŭ ĉefo en la Bahaja religio?

Respondo: La Bahajanaro reprezentas asocion de la kunlaborantaj servantoj. Ili ne havas ĉefon. Ilia sola gvidanto estas Dio. Ili ne havas enoficigitajn pastrojn aŭ diservistojn. Esta la devo de ĉiu, kiu ajn konas aŭ konfesas la principojn de tiu movado, ke li transdonu ilin al aliaj homoj. La Bahajanaro ne havas organizitajn misiajn centrojn, ĉar ilia fundamenta kredo estas la patreco de Dio kaj la frateco de la homoj. Ili ne havas teologiajn disputojn kaj metafizikajn konsiderojn.

Demando: Ĉu la Bahaja instruo rekreas la individuan vivon, aŭ ĉu ĝi prezentas nur aron da principoj por la starigo de interhomaj rilatoj sen postulo de persona renaskiĝo?

Respondo: La instruo de Bahá'u'lláh estas spiro de la Sankta Spirito, kiu rekreas homojn. Oni akcentegas kaj insistas je persona pureco, same en privata kaj publika vivoj.

Demando: Je kio kredas la Bahajanoj?

Respondo: Ili kredas, ke inter la homoj devas regi reciproka amo, ke universala amikeco devas esti praktikata, ke la senvivaj dogmoj devas esti forigataj, ke ni troviĝas ĉe la sojlo de epoko de interdependeco, ke ni devas forgesi antaŭjuĝojn, kaj ke Universala Amo devas fariĝi la ĉefmotivo de la dudeka jarcento.

Demando: Kion instruas la Bahajanoj?

Respondo: Ili instruas, ke la interna spirita ideo estas la sama en ĉiuj religioj, ke unika ĝenerala plano subtenas la fundamentojn de la estintaj kredoj, ke la pastraro profanigis la religion de Dio, ke la aktiva Dia Ideo estas kaŝita sub la krusto de malviva ekleziismo, ke la religio devas forskui sian mezepokan ĉifonan veston kaj surmeti la robon de Universalaj Ordonoj de Dio.

Demando: Kia estas la Bahaja kredo?

Respondo: Fidu al Dio. Estu bonkoraj al viaj kungefratoj. Plenigu la mondon per la spirito de amo. La spirito de fido en Bahajano estas tre forta. Lia fido al Dio bazas sur la favoro de la Sankta Spirito.

La objektivaj celoj de tiu movado estas la Unueco de la homaro, Universala Paco, Universala Amo, internacia kunlaborado, reciprokeco, agnoskado de la principoj de homa samsangeco kaj solidareco kaj la starigo de la Regno de Dio, unue en la koroj de la homoj kaj poste sur la tero. Jen estas la noblaj objektivaj celoj. Ĉu vi ne simpatias al ili? Ĉu ankaŭ vi ne

volas fari ĉion, kion vi povas por plirapidigi la alvenon de la realiga tago de tiuj celoj? Ĉu ĉi povas iel malutili? Ni laboras tage kaj nokte por la faktigo de tiuj ĉi ideoj. Al Dio kaj Liaj Servantoj ankaŭ plaĉas tiuj, kiuj servas sub diversaj standardoj kaj en malsamaj tendaroj por efektivigi tiujn principojn de la homaro.

La pordoj de kolegioj kaj universitatoj devas esti larĝe malfermitaj por adeptoj de ĉiuj religioj kaj anoj de ĉiuj nacioj, por ke tiuj ĉi diversaj popoloj el malproksimaj landoj povu renkontiĝi kaj asociiĝi en tiuj ĉi edukaj institucioj, studi reciproke siajn kutimojn kaj morojn, interŝanĝi siajn ideojn kaj forigi siajn kontraŭvolajn antaŭjuĝojn. Tiamaniere tiuj junuloj kaj junulinoj kreskos kun la ideoj de monda patriotismo. Ekzistas kelkaj misiaj kolegioj en la Oriento, laŭdogme sektaj, kiuj penas ĉiam instrui la studentojn pri la falseco de la religioj de iliaj gepatroj kaj pri la grandeco kaj supereco de kristanismo. La efektiva rezultato estas ĉagreniga malsukceso, ĉar ordinare la studentoj forlasas la kolegion sen kia ajn religio. Tiamaniere la sperto pruvis, ke kiam misiisto penas detrui ĉu per maldeca antipatio, ĉu per neĝustaj argumentoj la religion de la studentoj, en kiu ili estis edukitaj, li senkonscie samage detruas la religion de la kristanismo.

Koncize: en tiu ĉi lumradianta jarcento la suno de Realeco leviĝis, disĵetante siajn brilantajn radiojn sur la tutan homaron. Ni komencas realigi tion, ke nia tergloba fariĝu unu hejmo kaj ĉiuj homoj fratoj kaj fratinoj, anoj de unu familio, steloj de unu ĉielo, lampoj de unu kunveno, perloj de unu ĉirkaŭkolo, arboj de unu ĝardeno kaj signoj de favoro de la Plejpotenca. Ne ekzistas homoj denaske malbonaj. Ili estas ĉiuj bonaj. Nur kiam ni malatentas la originalan planon de la progreso, la rezultato estas kripligita kaj la stato de nia estado nenormala. La arbo de la homaro estas unu kaj ĝi estas plantita de Dio. La origino estas unu kaj la fino devas esti unu.

Universala religio.

(Parolado de D-ro A. Mühlshlegel, Stuttgart en la dua Baha'ikunveno dum la XVII-a Universala Esperanto-kongreso en Ĝenevo.)

Karaj samideanoj!

Ni ĉiuj ĉi tien kunvenintaj estas veraj samideanoj, ne nur ja pro tio, ke ni ĉiuj parolas nian karan Esperanton. Ni estas, kvankam alilandanoj, alikonfesianoj, aliprofesiuloj, samideanoj simple kiel serĉantaj homoj, serĉantaj amon kaj veron — religion.

Ni Bahaanoj sentas koran, varman ĝojon prezenti al vi la instruojn de Bahá'u'lláh kaj de lia klariganto 'Abdu'l Bahá, kies

ĉion-ampleksan grandecon kaj gravecon ni ne povas evidentigi al vi per kelkaj vortoj. Vi mem, ni esperas, post pli malpli longa studado kaj penado kaj vivado ĝin ekkonos.

La Baha'i-movado ne estas nur ia nova orienta religio apud aliaj religioj aŭ spiritaĵoj, ĝi estas simple la plinovigo de la religio; ĉar ekzistas nur unu Dio, unu amo, unu vero, unu religio. Tia unueca religio do estas tio, kion ni ĉiuj bezonas, ĉiuj serĉadas. Religio ja ne estas dogmo aŭ eklezio aŭ kulto aŭ bigoteco, religio estas ĉion-ampleksa, ĉion traiganta, ĝi estas la kara, varma, vigla, bela, ĝoja, lumanta vivo.


Sed ni ne nur entuziasmiĝu per la sento de ĉi tiuj ideoj, ni realigu ilin kaj ekkonu klare kaj detale, ĉar la nun komencanta homara epoko ne estas epoko de senracia kredo aŭ de senkreda racio, sed la epoko de unuigo de kredo kaj racio, la epoko de klara kompreno.

Ekzistas nur unu Dio, unu amo, unu vero, unu religio. Diversecaj kaj senfine ŝanĝeblaj estas nur la formoj de la Dia manifestado. La grandaj, malfalsaj profetoj estas la reflektantoj, la manifestantoj de la unu dia lumo, aperanta kiel amo kaj vero. Ili evidentigas la Dian lumon laŭ la kapableco de la samtempa kaj samnacia homaro, kiu ĉiam ŝanĝadas. Pro tio la eksteraj formoj de la religio same ŝanĝadas, tio estas, post kelka tempo ili estas aliformigitaj per iu nova profeto. Ni homoj tiam diradas, tiu aŭ tiu profeto fondis novan religion. Vere li fondis nur novan, plimodernan formon de la homa religio.

Ekzemple, ni rigardu Mozeon, Kriston kaj Bahá'u'lláh-on: Mozeo parolis iam al necivilizita nomada popolo. Pro tio li devis eduki ĝin precipe materiale kaj morale. Li manifestis la dekalogon kaj korpajn kaj moralajn ordonojn.

Kristo parolis al la antikva okcidenta mondo pli civilizita kaj pli diverseca ol tiu nomada popolo. Pro tio li povis kaj devis pli spirite instrui ol Mozeo. Kristo predikis pri la amo unuiganta teran diversecon kaj montris por ni la vojon al la „renaskiĝo el akvo kaj spirito“. Per Kristo la homaro povis pli bone kompreni Mozeon. Kristo venis, kiel li mem anoncis, por plenumi Mozeon. Kristo gloris lin, ĉar per la Kristanismo Mozeo, ĝis tiam malmulte konata Hebrea profeto, fariĝis mondkonata spirita heroo.

Nun venis Bahá'u'lláh. Li parolas al la tuta nuna homaro eĉ pli komplikata, pli diverseca ol la tiama, kiu estis la sklavo de ĝia evoluita intelekto. Sed pro la edukado per la Kristanismo kaj pro multjarcenta evoluado la nuna homaro kapabliĝis eksenti kun Dia helpo pli klare la unuecon de la fonto de ĉiuj religioj, la unuecan fonton de vero kaj amo. La nuna homaro pli bone povos nenigi la antaŭjuĝojn religiajn, naciajn, moralajn, socialajn, nenigi ĉiujn barojn inter la homa frataro. Tial Bahá'u'lláh



*Maŭzoleo de Bab kaj 'Abdu'l-Baha
sur la „Monto Karmel“ apud Haifa.*

manifestas la unu Dian veron kaj amon tiamaniere, ke li pliklarigas en multaj libroj nunajn kaj estontajn sciencajn kaj religiajn problemojn kaj unuigas la homaron per saĝaj ordonoj kaj praktikaj principoj.

Bahá'u'lláh tute ne estas konkuranto aŭ malamiko de Kristo — groteska ideo rigardante du majestajn manifestantojn de la unu Dio. Per Bahá'u'lláh la Kristanaro pli bone komprenos Kriston, kiel per Kristo ni pli bone komprenas Mozeon, Bahá'u'lláh plenumas kaj efektiviĝas la vortojn de Kristo, kiel Kristo plenumis kaj efektiviĝis la vortojn de Mozeo. Kiu ajn estas bona Kristano, tiu estas Bahaano. Sed fariĝi bona Kristano aŭ Bahaano estas malproksimega celo atingebla nur post longa, penplena marŝado. Ni ĉiuj senescepte bezonegas helpon kaj edukadon per amo, instruado kaj praktikaj principoj.

Unu el la Bahaaj principoj, klarigantaj kaj unuigantaj la homaron estas, kiel vi sciĝis, la ordono de la kreado de help-lingvo. Bahá'u'lláh ordonas en la libro „Ísraká“:

„Per unueco la regionoj de la mondo ĉiam estis lumigitaj en la lumo de la Dia sendaĵo“

Pli frue en tabletoj Ni ordonis, ke la komisiitoj de la „Domo de Justeco“*) devas elekti unu lingvon el la estantaj lingvoj aŭ krei ian novan lingvon kaj same elekti unu el la diversaj skriboj kaj instrui la infanojn de la lernejoj de la mondo tiel ke la tuta mondo povas esti konsiderata kiel unu patrujo kaj unu hejmo.

*) estonta Baha'i-centra administracio.

La plej ŝatinda frukto de la arbo de scio estas jena majesta vorto:

Vi ĉiuj estas fruktoj de unu arbo kaj folioj de unu branĉo. Gloro ne estu al tiu, kiu amas nur sian hejmlandon, gloro estu al tiu, kiu amas la tutan mondon.“

Ni pripensu, samideanoj!

Tion ĉi ordonis antaŭ multaj jardekoj profeto en necivilizita orienta lando. D-ro L. L. Zamenhof dum sia benporta vivo efektivigis tiun esperantan internan ideon, la spiriton de estiĝanta nova homaro, la spiriton de Bahá'u'lláh.

Pro tio D-ro Zamenhof estis vera Bahaano. Kaj ĉiuj Bahaanoj en la tuta mondo honoras lin kiel idealan modelon, amas lin kiel majstron kaj fraton.

El la Baha'i-movado.

Germanio.

El Zuffenhausen oni raportas: „... Nia Esperanto-klaso havas 15 partoprenantojn; ni esperas, ke almenaŭ 10 restos ĝis la fino.“ En Stuttgart fondiĝis komence de decembro 1925 Baha'i-Esperanto-grupo kun ĉ. 12 membroj. La Baha'i-movado de Hamburg intime interrilatas kun la „Deutsche Gesellschaft für psychische Forschung“ (Germana Societo por psika esplorado), kies sciiga gazeto ĉiam enhavas artikolojn pri Baha'i-ismo. La Baha'i-kunvenoj valoras por la societo kiel Baha'i-studadronoj. — Amiko el la ĉi-tiea rondo disponigis sian postlaboran tempon al la porblindula biblioteko, por kiu li transskribos verkaĵojn kaj librojn en brajlan skribon; li ankaŭ intencas poste brajligi Baha'i-skribaĵojn. Ekzistas nun la ĉi-sekvantaj du Baha'i-Esperanto-grupoj en Hamburg kaj Wandsbek:

● *Baha'i-Esperanto-grupo Hamburg*; kunvenas vendrede je la 20-a horo, Spitalerstr. 6, ĉambro 14. Adr., Fr. Gerstner, Oelmühlenweg 66: Wandsbek.

Baha'i-Esperanto-infangrupo Wandsbek; kunvenas dimanĉe je la 10.30 horo ĉe la instruanto D-ro H. Grossmann, Schillerstr. 1a, Wandsbek.

Aŭstrio.

La Baha'i-geamikoj de Wien pluŝ lernas Esperanton.

Svisio.

En la internacia Baha'i-oficejo de Ĝenevo 19, rue Georges Favon, kunvenas regule 40—50 interesiĝantoj.

Egiptio.

Decido de mahometanaj klerikaj juĝistoj en Kom-el-Saayda deklaris malvalidaj la edziĝkontraktojn de la tie loĝantaj geamikoj pro ilia aneco al nia amata movado. Ĉar tiu decido minacas la edzecon de ĉiuj venintaj el la Islam-geamikoj; tiuj protestas kontraŭ ĝi.

Persio.

La edukad-komitato de Teheran aranĝis prelegkunvenojn kun ĉ. 150 partoprenantaj Baha'i-junuloj. Ankaŭ ses instrukunvenoj por virinoj estas aranĝitaj kaj bone vizitataj. — En Shahmirzad la geamikoj suferas sub la turmentoj de la kontraŭuloj; fermita estas ilia lernejo kaj atakita kaj elrabita la domo de amikino. La gubernia estraro ne jam ree maltermis la lernejon malgraŭ protesto de la amikaro. — Ankaŭ en Shish-evan la geamikoj pasive rezistas kontraŭ la atakoj de la kontraŭuloj.

Usono kaj Kanado.

Al Bahai'-gazetarkomitato 40 gazetoj sin deklaris pretaj represi raportojn pri la malfacilaĵoj prezentiĝantaj al la Bahai'-movado en Persio. Instrukciojn por tiu laboro la komitato pritrakto interkonsente kun Shogi

Effendi. — En Oakland (Cal) fondiĝis nova Bahai'-grupo kun ĉ. 40 interesigantoj. — El Montclair (N. J.) oni raportas: „Ni komencis fondi en ĉiu ŝtato Baha'i-Esperanto-centrejon.“ — En Montreal Baha'i-Esperanto-kurso estas projektata.

Nov-Zelando.

En Auckland estas fondita Baha'i-gazeto „The Herald of the South“ (La Heroldo de l' Sudo). Abonmen-
dojn je £ — 9.— poĵare sendu al
sino A. E. Dewing, 5, Aldred Road,
Remuera, Auckland (Nov-Zelando).

Alsenditaj gazetoj kaj broŝuroj.

Esperantaj:

- „Vegetarano“, internacia oficiala kvaronata organo de VLE kaj MCV; n-ro VIII, 4. 10 25; poĵare hfl. 2.—; Alsterkrugchaussee 586, Hamburg-Fühlbüttel (Germanio).
- „Ligilo por Vidantoj“, oficiala informilo de UABE; n-ro 2-3, 1925; poĵare sv. fk. 4.—; Majorsgatan 12, Stockholm (Svedio).
- „Liberpensulo“, oficiala sesonjara organo de LL; n-ro I 5, sept.-dec. 1925; liganeco kun gazeto poĵare Rmk. 2.—; Mariannenstr. 22 I, Leipzig-Neustadt (Germanio).
- „Oomoto“, monata esperanta gazeto; n-ro I. 11, nov. 1925; poĵare sv. fk. 4.80; Fremdlanda Propaganda Oficejo Kameoka (Japanio).
- „Oomoto“, internacia monata organo de UHA; n-ro I. 1, jan. 1926; poĵare sv. fk. 2.—; 4, rue Vaugirard, Paris VI (Francio).
- „Belga Esperantisto“, oficiala monata organo de BLE; n-ro XI. 8-9, aŭg.-sept. 1925; poĵare b. fk. 12 50; Kl. Hondstraat 11, Antwerpen (Belgio).
- „Kataluna Esperantisto“, oficiala sesonjara organo de KEF kaj IFL; n-roj III. 15-16 kaj 17-18, sept.-okt. kaj nov.-dec. 1925; poĵare sv. fk. 6.—; Carrer Valencia 245, Barcelona (Hispanio).
- „Samosa Esperantisto“, oficiala sesonjara organo de la SES; n-roj VI. 1-2 kaj 3-4, sept.-okt. kaj nov.-dec. 1925; poĵare \$ 1.—; Samosa Esperanto Societo Samos (Grekio).
- „Utrechta Esperantisto“, oficiala monata organo de UER; n-ro I. 7, dec. 1925; Rietstraat 40, Utrecht (Nederlando).

- „Sennaciulo“, II. 1, 2, 3; Leipzig-Stö.
- „Esperanto Junularo“, VII. 31; Leipzig-Mö.
- „La Kolportisto“, I. 6; London WC.1.
- „La Unuigita Tuhomaro“, VII; nov.-dec. 1925; Hamburg 15.
- „International Language“, II. 11, 12; London WC 1.
- „Hungara Esperantisto“, VIII. 10-12; Budapest IV.
- „Bulgara Esperantisto“, VII. 1-3; Sofio.
- „La Movado“, VIII. 81; Paris IX.
- „Le Monde Espérantiste“, XVIII. 5; Paris XIV.
- „La ridanta Esperantisto“, I. 3; Elze (Hannover).

Interlingva.

- „Interlingua“, historio ktp. de interlingua de Prof. G. Peano.
- „Academia pro interlingua“, oficiala organo; 4-5 de I. VIII, 25 10. 1925; poĵare ? fk. 10.—; via Costigliole 1; Torino V (Italio).

Germanaj:

- „Weltjugendliga, Verband Deutschland“ (Mondjunularligo, Unuigo de Germanio); Möckernstr. 133 a; Berlin SW. 11 (Germanio).
- „Abstinenter Sozialist“ (Sindetenula Socialisto). oficiala monata organo de SALS; n-ro X, 11. 11. 1925; Ostermündingen, Bern (Svisio).

Anglaj:

- „Baha'i-News-letter of USA and Canada“, informfolio de SNA, 8. 11. 1925; Green Acre, South Eliot, Maine (Usono).
- „Baha'i-News of Persia“, monata informfolio, nov. 1925; Achmed Yazdani Kazravi; Teheran (Persio).

Angla, birma, persa:
„The Dawn“, III. 2-4; Rangoon.

Franca:
„La Prophylaxie mentale“, kvaronjara organo de LHM, n-ro I. 1-2, 1-a kaj 2-a kvaronjaroj 1925; poŝtare fr. fk. 8.—; 4, rue de Sèvres, Paris VII (Francio).

Pola:
„Myśl Wolna“ (Libera Penso), monata organo de SWP; n-ro IV. 10-11, okt.-nov. 1925; ul. Elekoralna 13 m. 9; Warszawa (Polio).

Flandra:
„Gazet van Mechelen“ (Volksdagblad), n-ro XXX. 269, 12. 11. 1925; 18, oude Brusselstraat, Mechelen (Belgio).

Komunikoj de la administracio:

Ĉiaj represoj kaj tradukoj el „LNT“ estas permesataj, nur oni bonvolu indiki la fonton kaj al ni sendi ekzempleron!

Same ni petas pro transsendo de ĉiuj lingvaj gazeteltranĉaĵoj, (se eble algluitaj al titoloj), almenaŭ kun indiko de titoloj, n-roj kaj datoj de la ilin enhavantaj gazetoj), kiuj rilatas la Baha'i-Movadon aŭ „La Nova Tago“-n por kolekto en nia arkivo.

Ĉar pligrandiĝos la gazetnumeroj de la 2-a jarkolekto, la prezo plialtiĝos por Germanoj kaj Aŭstrioj al Rmk. 1.— kaj eksterlandanoj al 5 respondkuponoj poŝtare.

La n-roj de la 2-a jarkolekto elvenos dum 1926/27.

II. 1 je la 21-a de marto 1926.

II. 2 je la 5-a de junio 1926.

II. 3 je la 8-a de septembro 1926.

II. 4 je la 12-a de decembro 1926.

Plue ni intencas aperigi specialan kongresnumeron por la XVIII-a Universala Esperanto-Kongreso en Edinburgh, se la financaj cirkonstancoj tion permesos.

Administracio:

„La Nova Tago“, Oelmühlenweg 66, Wandsbek, (Germanio).

Respondeca: *Friedrich Gerstner*, sama adreso.

Ĉiujn demandojn pri la Baha'i-Movado, la mendon de la gazeto ktp. oni bonvolu sendi al la administracio.

Presejo: Heroldo de Esperanto, Horrem b. Köln (Germanujo).

